

FALO DE LA ROMIA IMPERIO

Edward GIBBON (08.05.1737 – † 16.01.1794) estis la plej influa brita historiisto ekde la epoko de Tacitus (mortis 115). Lia ĉefverko, The History of the Decline and Fall of the Roman Empire (La Historio de la Dekadenco kaj Falo de la Romia Imperio), unue eldonita en 1776, estas gravega verko, kies influo ankoraŭ nun montriĝas. En ĝi li taksas la kaŭzojn, pro kiuj en la jaro 476 falis la Romia Imperio tiel ĉi:*

1. Plejparto de la loĝantaro preferas amuzon anstataŭ laboron.
2. La tradicia rolo de patroj kiel vivtenantoj de la familio estas dubigata, multobliĝas malordigitaj rilatoj kaj fraŭlinaj patrinoj sen patroj.
3. Grandaĝuloj estas neglektataj. La homoj zorgas pri hejmaj dorlotbestetoj pli, ol pri siaj maljunaj gepatroj.
4. Literaturo kaj arto fariĝas neinteligentaj, estas kreata fienhava amuzo. Tiel nomataj artobjektoj estas malbelaj, sengustaj, nenion dirantaj, sed tamen de la riĉuloj aĉetataj por grandega monsumo.
5. Honora militservo al la patrujo estas rifuzata, pridubata, primokata kaj fine per la leĝo nuligata. Militistaron formas dungitaj solduloj.
6. La homoj diligente laborantaj estas primokataj kaj la modeloj estas sterilaj fariseoj, popolistoj, dubindaj artistoj kaj tiel nomataj celebruloj.
7. La impostoŝarĝo de la loĝantaro ĉiam kreskas kaj la ŝtato redistribuas neadekvate grandajn sumojn. La homoj ne timas mallabori, ĉar la ŝtato ĉiam iel prizorgos ilin.
8. La nivelo de la edukiteco rapide malkreskas.
9. La ŝtata ŝuldo kreskas ĝis neniam pagebla alto.
10. Oni ĉesas fabriki kaj kultivi, ĉar landana produktado estas multekosta, nutraĵoj kaj produktoj estas enportataj el la satelitaj landoj.
11. Tiu, kiu posedprenos postenon, kie li povas ŝteli ŝtatan havaĵon, tiu plejkaze faras tion. La ebleco de regreso – reveno estas tre malgranda.
12. Naskado kaj edukado de la infanoj estas konsiderataj kvazaŭ ĝenaj kaj la nombro de naskiĝantaj infanoj malkreskas.
13. Dum la jaroj atestitaj meĥanismoj gardantaj honestajn homojn kontraŭ friponoj subite fiaskas.
14. Publikaj funkcioj fariĝas objektoj de rabakiro, estas akirataj per monsubaĉetaĵoj, kaj tiu, kiu atingis ilin, volas rabakiradi, por ke la investita subaĉetaĵo kelkoble plialtiĝu al li.
15. Dum la jarcentoj de antaŭuloj testitaj valoraĵoj – kiel honoro, sento pri sia devo kaj respondeco, entuziasmo labori, bonfarado, laborfervoro por publikaĵoj estas primokataj.
16. Vastiĝas cinikismo.
17. Vastiĝas malŝparado, malmodereco, malfamigado de la konoj, lertoj kaj de honesta laboro.
18. En la landon venas multaj eksterlandanoj.
19. Politikistoj entrudiĝas al aĉularo, kiu postulas amuzon kaj ŝtatajn subtenojn (panon kaj ludojn).
20. La civitanoj pro ĉio ĉiam grumblas.

Tiom Edward Gibbon en la jaro 1776 pri la falo de la Romia Imperio. Ĉu tio ĉi memorigas ankaŭ ion al vi?

Josef Hron (Aperinta en Informilo, monata gazeto de E-handikapuloj, junio 2013)